

Dumkonferencaj kursoj por komencantoj

La Konferenco en Oostende, 17-25 julio 2015, proponas komencajn kursojn de Esperanto kaj allogan turisman programon por la komencantoj. ILEI invitas siajn membrojn en ĉiuj landoj organizi kaj gvidi grupojn de komencantoj el sia lando, kiuj partoprenos la konferencon por lerni Esperanton kaj ĝui la programon speciale adaptitan por ili.

Se vi organizos kaj gvidos tian grupon de komencantoj kaj se vi ĉiuj loĝos en la konferenceja junulargastejo *De Ploate*, vi kiel grupgvidanto ĝuos jenajn rabatojn:

- 50% de la kotizo, se vi gvidas minimume trimembran grupon, 75% por kvarmembra kaj 100% por kvinmembra grupo;
- por ĉiu plusa grupano ekde la 6-a ĝis la 10-a vi ĝuos 5%-an rabaton de la loĝkosto en plurpersona (2, 4, aŭ 6-lita) ĉambro.

Por tiaj konferencanoj – komencantoj en Esperanto – estos organizitaj:

- E-kurso gvidata de instrusperta konferencano, 3-4 horojn ĉiutage
- Ekskursiva programo pli riĉa ol por la ordinaraj konferencanoj laŭ la samaj prezoj kiel por ceteraj konferencanoj; vi mem estos bonvena helpi kiel ĉiĉeron-interpretisto por viaj grupanoj kaj aliĝi al tiaj ekskursoj senpage.

Grave: Bonvolu prizorgi kaj helpi viajn grupanojn, ke ili ĉiuj aliĝu, mendu la loĝadon kaj sendu la pagon ĉu pere de vi, ĉu al konto de ILEI.

La aliĝilon kaj pliajn informojn pri la konferenco vi trovos ĉe

<http://www.ilei.info//agado/Ostendo2015.php>.

Estrarano pri konferencoj, Radojica PETROVIĆ